Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio

# Abelo



Mardo, la 9-a de julio 2019

*N-ro 4*

## La solena inaŭguro

**Solena inaŭguro de BET-55 okazis dimanĉe la 7-an de julio je la 15-a horo en la urba Komunuma Centro (Kranto str. 28).**




La prezidanto de la organiza komitato kaj prezidanto de LEA Povilas Jegorovas prezentis la oficialajn gastojn.



Post la enkonduka parolado eksonis himno de Esperanto, kunkantata de la partoprenantoj.



Sekvis salutmesaĝoj de litoviaj politikistoj kaj de la urbestro Rytis Račkauskas.

## Programo


### La 10-an de julio (merkredo)

| | |
|---|---|
| **7.00–8.00:** | Matenmanĝo – la unua alterno. |
| **8.00–9.00:** | Matenmanĝo – la dua alterno. |
| **8.00–9.00:** | Tuttaga ekskurso. |
| **12.30–13.30:** | Tagmanĝo (por restintoj en la BET-ejo). |
| **18.30–19.30:** | Vespermanĝo. |
| **20.00–21.00:** | Koncerto de Jogailė Ĉojūtė. En la urba komunuma centro (Kranto str. 28. Salono de Aranĝoj). |

## Por ne-ekskursantoj:

**10.00**: Meso en Esperanto, en Katedralo celebros M. Dyglys, str. Katedros a. 1.







La jubilean BET-on salutis ankaŭ Biruta Rozenfelde, la ĉeforganizantino de la unua BET antaŭ 60 jaroj ĉe la latvia ĉefurbo Riga, kun tre impresaj rememoroj.



Post la inaŭguro de BET-55, dum la kultura programo, faris koncerton kaj dancprezentojn artaj grupoj de Komunuma Palaco de la urbo Panevėžys:



Profesoro pri astrofiziko en la Hebrea Universitato de Jerusalemo kaj membro de Akademio de Esperanto Amri Wandel, prezidanto de Israela Asocio pri Astrobiologio, kiu dum BET-55 gvidos la universitatan sesion de AIS, parolis pri Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino (AIS), kies prezidanto li estas, pri Internacia Kongresa Universitato dum Universalaj Kongresoj kaj pri IKU-libroj.



Grupo de junulara dancrondo „Grandinėlė“, gvidantino Zita Rimkuvienė, grupo de pli aĝaj dancantoj de popoldancoj „Verdenė“, gvidanto Vytautas Murauskas, miksita koruso „Čiūto“ kaj vokala ensemblo „Smiltelė“ , gvidantino Dalia Gaspariūnienė. Ili bondeziris sukceson al BET-anoj en la ĉiutagaj agadoj, ridojn kaj varmkoran etoson en la amikaj vesperaj programoj.

**15.00-18.00**: Panevėžys’a bazlernejo de surduloj kaj duonsurduloj, Parko strato 19, sidejo de la loka Esperanto-klubo “REVO”, estos renkontiĝo kun varia programo:
– Koncerto de la ensemblo “Pušelė” (Pineto);
– Dresitaj hundoj;
– Artaĵoj el lano;
– Eduka arta kaj sporta programo;
– Kantado, ludoj, dancado ĉe bivakfajro kun trinkado de teo kaj gustumado de lokaj dolĉaĵoj;
– Ni ankaŭ plantos “Arbon de BET-55”!

Se ne pluvos, la programeroj okazos ekstere. Se estos intereso, mendeblas buseto, de la lernejo ĝis la manĝejo, kontraŭ 1 eŭro. Kiu ne mendis vespermanĝon en la kongresa manĝejo, povas je 3 eŭroj partopreni lernadon de agordkantado (sutartinės), kiu okazos je 18.00 en la arta ateliero “Sesių palėpė”. Adreso: Smetonos 2 en la urbocentro.

# Manĝmenuo por BET-55

**La 4a tago, merkredo** (2019-07-10)

| | | |
|---|---|---|
| **Matenmanĝo** 7:00 – 9:00 | Kuiritaj makaronioj | 100 g |
| | Kolbasetoj „grill“ | 100 g |
| | Freŝaj legomoj | 50 g |
| | Tomata saŭco | 20 g |
| | Kafo, teo | 200 g |
| **Tagmanĝo** 12:30 – 14:30 | Supo el ruĝaj betoj | 250 g |
| | Fritita marezoko | 100 g |
| | Kotletetoj el kokaĵo kun sezamaj semoj | 120 g |
| | Kuirita rizo | 100 g |
| | Salato el freŝ-brasikoj kun kukumoj, freŝaj legomoj | 80 g 20 g |
| **Vespermanĝo** 17:30 -19:30 | Samogitaj terpomaj flanoj kun krema saŭco | 200g / 40 g |
| | Gistaj flanoj kun konfitaĵo | 200 g / 40 g |
| | Teo | 200 g |




Vespere post la inaŭguro kaj la koncerto okazis en la urba Komunuma Centro por ĉiuj BET-anoj urbestra akcepto, kun riĉaj manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj bona amuzo.

# Koncerto de Sepa kaj Asorti

**Dimanĉe vespere okazis en la ĉefa salono de la universitata konstruaĵo koncerto de la konata esperantista grupo Sepa kaj Asorti.**

La grupo fondiĝis kiel Asorti en 1982. Ĝi estas tripersona familia grupo: Edvardas Piščikas, Edgaras Piščikas kaj Elena Piščikienė. La grupo prezentiĝas profesie dum grandaj internaciaj muzikaj festivaloj, motorbiciklaj festoj, foiroj, naciaj festoj, urbofestoj, Universalaj Esperanto Kongresoj ktp. Ĝia muziko sonis en televidaj programoj, ekzemple. "Eurovision", "X-Faktor", "Du minutoj da gloro" kaj aliaj. Ĝi kantas en la stiloj kontrea, blusa, folka kaj roka en la lingvoj rusa, litova, angla kaj Esperanto. Ekde sia fondiĝo Sepa kaj Asorti popularigas Esperanton tutmonde por neesperanta publiko pere de grandaj koncertoj por vasta publiko.



Asorti estas ofta koncertanto dum esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj en Litovio kaj en pluraj landoj. Unuafoje ĝi kantis en Esperanto en Muzo-92 en Litovio. Sekvis Esperanto-koncertoj en Pollando (1993), Belarusio (1993), Hungario (1994), Germanio (trifoje 1995), Belgio (turneo en 1995), Finnlando (UK en 1995) kaj dekoj da koncertoj dum la sekvintaj dudek jaroj. Ekzemple, en 2015 Sepa kaj Asorti prezentiĝis en la internacia renkontiĝo "Elloke-Tutmonden" en Verceli (Italio, marto 2015), Internacia ▼

# Saluto de la kulturminstro Mindaugas Kvietkauskas



**„Ĉiuj esperantistoj estas iomete litovoj",**

– dum la Vilna Universala Kongreso de Esperanto deklaris tiama prezidanto de UEA Renato Corsetti, substrekante ligon inter ambaŭ lingvoj. Verŝajne ĉi tiu eldiro plej proksima estas por baltlandaj esperantistoj.

Do mi salutas ĉiujn partoprenantojn de Baltiaj Esperanto-Tagoj, kunvenintajn en Panevėžys. Esperanto estas lingvo, unuiganta samideanojn en la tuta mondo kaj prezentanta al ili unikan kaj universalan rimedon de komunikado. Kuniga ligilo inter ĉi tiu lingvo kaj Litovio estas Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Umberto Eco iam diris, ke la deveno kaj personeco de ĉi tiu homo sendube grave kontribuis al la ideo kaj sukceso de la nova lingvo.

Litova Esperanto-Asocio ĉi-jare festas sian centjariĝon, kaj min ĝojigas ĝia aktiva kaj multflanka agado: flegado de memoro pri Ludoviko Zamenhof, abundaj internaciaj projektoj, kiuj famigas nian landon, libroeldonado, edukado.

Kiel unu el la ĉefaj celoj de Esperanto, de lingvo ekzistanta jam 130 jarojn, oni povas nomi detruon de muroj inter nacioj, rasoj kaj diversaj spiritaj mondoj, ankaŭ stimuladon de internacia kultura diskutado.

Mi deziras al vi ankaŭ estontece flegi kaj disvastigi spiriton de la lingvo, mi deziras enhavoriĉan kaj sencoplenan aranĝon, inspirajn kaj esperigajn ideojn!

Litovia Ministro pri Kulturo
**Mindaugas Kvietkauskas**

Junulara Festivalo en Brusson (Italio, aprilo 2015), Filmfestivalo en Ĉinio (aprilo 2015), Germana Esperanto-Kongreso en Hameln (majo), SES en Martin (julio), UK en Lillo (julio), IJK en Wiesbaden (Germanio, aŭgusto) kaj en Arkones en Poznano (Pollando, septembro).

**La grupo eldonis ok muzikajn albumojn en Esperanto:**
Se povus mi (1994),
Ni denove renkontiĝos (1995),
Edgar + Asorti (1995),
Lernejaj amikoj (2005),
Kantu kune (2007),
Verda Hejmo (2009),
Espero (2013),
Teo kaj amo – koloroj de l' mondo (2015).

**Serĉataj kontaktoj kun instruistoj de Esperanto**

Mi instruas en elementa lernejo en Pollando. Miaj gelernantoj estas 10-12-jaraj. Mi serĉas leteramikojn por ili.

**Retadreso:** Jolanta Kieres, jola11k@interia.pl

**Poŝta adreso:** ul. Grodska 11, PL-33-300 Nowy Sącz, Pollando.

## Koncerto "Pacon kune"

Koncerto de Jogailė Čojūtė, Sung Minwoo kaj Kim Yulhee sub la titolo "Pacon Kune" okazos je 20:00-21:90 merkrede (Kranto str. 28, Salono de Aranĝoj). Jogailė kantos koreajn kaj litovajn kantojn kun akompano de koreaj tradiciaj instrumentoj.




## Amira Chun

Multnombraj koreaj partoprentoj kolorigas kaj riĉigas la programerojn de la ĉi-jara BET kaj kantado de la talenta kantistino Amira Chun kreis speciale unikan orientecan etoson dum ŝia artnivela kanta programo. Ankaŭ ŝia filino kontribuis al la programo per sia muziko kaj grupo de BET-anoj elektis ŝin "Belulino de BET-55". Vidu la alkroĉitan foton. **Gábor Márkus**




**Iu lasis dimanĉe sian kongreslibron (Libron por BET-ano) en publika aŭtobuso. La libro estas trovita kaj oni povas ricevi ĝin de Márkus Gábor el la hungara grupo.**

### Ĉu vi jam kontribuis al *Abelo*?

En *Abelo* vi trovas aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-55, fotojn k.s. La enhavo dependas ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj ktp, kaj poste aŭ metu la kontribuojn en tiucelan skatolon ☚ ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: *stano.marcek@gmail.com*. Ankaŭ kvalitaj fotoj estas bonvenaj, same kiel pri-BET-aj anekdotoj kaj rakontoj.



**Stano Marček, via redaktoro**